**Lingva diskriminacio: la tutmonda trarigardo estas sangofrostiga.**

Tiom en Eŭropo, kiom en la tuta mondo, la situacio vertiĝe malplibonigas. La angla gajnas terenon pli kaj pli, spite al la respekto de la lingvaj rajtoj, kiujn, kaj la eŭropaj institucioj kaj la internaciaj organismoj, diras ke volas defendi.

UNESCO kalkulas ke en la daŭro de ĉi tiu jarcento, inter 50% kaj 90% de la lingvoj de la mondo malaperos. Kun ili malaperos ankaŭ la popoloj al kiuj tiuj ĉi lingvoj donas voĉon, kaŭzante genocidon de tutaj popoloj per lingva vojo. Ja fine la angla lingvo konturiĝas kiel vera lingva imposto, kiun pli kaj pli da popoloj pagas perforte, imposto kiun la regantoj mem trudas al siaj popoloj.

Ni kredas ke alia mondo estas ebla. Ni kredas je la alternativo socie, politike, ekonomike justa kiu estas esperanto: lingvo de ĉiuj, lingvo por ĉiuj, kiu garantias la respekton de la identeco de ĉiuj.

Ni kredas ke pro tio estas nepre necese alporti la problemon al la atento de la institucioj, por ke *oni parolu* pri lingva diskriminacio, por ke Eŭropo ĉesigu kaŝi sin malantaŭ oligarkia plurlingveco, en kiu nur tre malmultaj lingvoj estas vere defenditaj. Pri lingva diskriminacio *oni devas* paroli, tiom socie, kiom institucie, kaj por la lingva diskriminacio *oni devas* trovi solvon.

Ni alportis la aferon al la Eŭropa Parlamento: "SOCIAJ, EKONOMIAJ KAJ POLITIKAJ EFIKOJ DE LA LINGVA DISKRIMINACIO". Partoprenu al la aŭskultado: ni portu al la atento de la eŭropa  trarigardo la internacilingvan oportunecon.

Jen la programo: (2ª kaj 3ª paĝoj)

**"SOCIAJ, EKONOMIAJ KAJ POLITIKAJ EFIKOJ DE LA LINGVA DISKRIMINACIO"**

**la 2-an de Julio 2007**

**ĉambro ASP 3G3**

**14.30 - MALFERMO: Giorgio PAGANO**, Sekretario de ERA onlus, Asocio por la lingva demokratio.

**14.40 -** projekciado de la filmeto "En Tramo" skribita kaj direktita de la itala reĝisoro **Filippo SOLDI**, pri la scenejo de la angla kiel nura eŭropa oficiala lingvo..

**14.55 - Prezidanto: Johan HÄGGMAN**, Eŭropa Komisionano – Ano de la Kabineto de la Komisionano por Plurlingveco Leonard Orban, kun ministra fako pri Plurlingveca Politiko, speciale pri regionaj kaj minoritataj lingvoj kaj pliigi la konscion pri lingvoj.

**15.00 - Ina DRUVIETE**, Parlamentanino de la Latvia Respubliko, Profesorino pri Ĝenerala Lingvistiko de la Letvia Universitato, eksministrino pri Edukado kaj Scienco (2004-2006), eksestrino pri Homaj Rajtoj kaj de la Komisiono pri Sociaj Aferoj .

**15.20 - François GRIN**, Profesoro pri Ekonomiko en la Universitato de Ĝenevo, direktoro de la Observatorio ELF en la lernejo por Interpretistoj kaj Tradukistoj de Ĝenevo, fakulo pri ekonomiko de la komunikado.

**15.40 - Fernand DE VARENNES**, Profesoro de la Universitato Murdoch en Perth, Okcidenta Australio, fakulo pri Homaj Rajtoj kaj ĉefesploristo en la ECMI (Eŭropa Centro por Minoritataj Aferoj).

**16.00 - Diego CORRAINE**, Direktoro de la "Oficejo por la Sarda Lingvo", Profesoro pri "Lingvistiko de la Minoritatoj: Sardinio" en la Universitato de Sassari, kunordiganto de la majstrokurso pri "traduko en Sarda lingvo kaj Interkulturaj Studadoj", Universitato de Nuoro.

**16.20 - Hugo BAETENS BEARDSMORE**, Profesoro de la Universitato de Bruselo, aŭtoro de eseoj pri dulingvismo kiel "Eŭropaj modeloj de dulingva edukado", "Elementoj de dulingva teorio", "Dulingvismo: bazaj principoj".

**16.40 - Bojan BREZIGAR**, Direktoro de "Primorski Dnevnik", itala ĵurnalo skribita en la slovena lingvo, por la slovena lingva minoritato en Italio.

**17.00 - Miquel STRUBELL**, Akademiestro de la Fakultato de Historio kaj Filologiaj Studadoj kaj Profesoro pri Lingvaj kaj Kulturaj Studadoj en la Universitato Oberta de Katalunio.

**17.20 - Claude HAGEGE**, Profesoro pri Lingvistika Teorio en la "Collège de France".

**17.40 - 18.00 ĜENERALA DEBATO, kun Marco PANNELLA**, Eŭropa Parlamentano.

**la 3-an de Julio 2007**

**ĉambro ASP 3G3**

**9.00 - Enkonduko**
**Prezidanto: Henrik LAX**, Eŭropa Parlamentano, anstataŭanto por la komitato pri la Medio, Publika Sano kaj Sekureco de la Manĝaĵoj, ano de la Delegacio de la EU- Rusio Komitato por Parlamenta Kunlaboro, kaj anstataŭanto por la Delegacio por la EU- Moldavio Komitato por Parlamenta Kunlaboro.

**9.20 – Davyth HICKS**, ĉefeditoro EUROLANG, EBLUL

**9.40 - Simone KLINGE**, Lingvistino, Ano de la Konsilio de Eŭropo, kaj de la Sekretariato por la Eŭropa Ĉarto por la regionaj kaj minoritataj lingvoj.

**10.00 - Michael KRAUSS**, Usonana Lingvisto, direktoro de la Centro de la Alaska Denaska Lingvo de ĝia komenco en la jaro 1972 ĝis lia emeritiĝo en Junio 2000. Li estas unu el la unuaj, kiuj estigis konscion pri la tutmonda problemo de la lingvoj en danĝero, aŭtoro de "La evoluoj de la estingiĝo de la lingvoj".

**10.20 - Tangi LOUARN**, Prezidanto de la Eŭropa Departemento de la Malpli Uzataj Lingvoj (EBLUL), vicprezidanto de la Kultura Konsilio de Bretonio.

**10.40 - Jean-Loup CUISINIEZ**, Sindikatisto de la CFTC "Franca konfederacio de la katolikaj laboristoj", informisto de la institucio"La rajto de la laboristoj paroli france en Francio", fakulo pri lingva diskriminacio: "Lingva diskriminacio en-la-laboro: alprenendaj politikoj, sekvantaj juraj vojoj".

**11.00 - Federico GUIGLIA**, Ĵurnalisto, esploristo, verkisto, aŭtoro de "Sur la pinto de la lango", "La nigra suno", "Italoj sen limoj".

**11.20 FERMO: Marco CAPPATO**, itala Eŭropa Parlamentano.

Skribitaj Kontribuaĵoj:
Malgorzata HANDZLIK, pola Eŭropa Parlamentanino
Tove Kangas, Lingvistino, esploristino kaj aŭtorino de "Lingva Genocido en la edukado".

- - -